

# Ĝeneralaj Kondiĉoj rilate al tradukado-servoj

## 1. amplekso de la Ĝeneralaj Kondiĉoj

Ĉi tiuj Ĝeneralaj Kondiĉoj (ĜK) difinas la kontrakto-aranĝojn rilate al tradukado-servoj aŭ al similaj servoj konkluditaj inter la tradukistino-terminologino unuflanke kaj la kliento aliflanke, kondiĉe ke oni mencias tiujn ĜK-ojn kiam la kontrakto estas interkonsentita kaj kaze ke ambaŭ partioj ne kune adoptas aliajn konvenciojn.

## 2. amplekso de la servoj

La tradukistino-terminologino engaĝigas sin por traduki la fonto-tekston kun ĉia zorgemo, sen aldoni nek forpreni iun ajn enhavon, kaj por liveri la tekston kadre de la interkonsentita limdato.

Se la kliento ne donas specifajn indikojn pri la formo de la traduko (cifereca aŭ papera formo, enpaĝigo aŭ tiparo), la tradukistino-terminologino uzas la fonto-tekston kiel referencon.

La tradukistino-terminologino rajtas kaj peti al krompersonoj ke ili helpu por plenumi la kontrakton kaj pludoni la kompletan plenumadon al krompersonoj, kondiĉe ke tiuj krompersonoj engaĝiĝas por konfidenceco konforme al punkto 8.

## 3. Partopreno de la kliento

La kliento devas doni al la tradukistino-terminologino iun ajn informo, kiu necesas aŭ utilas por traduki (kiel ekzemple internaj glosaroj, dulingvaj tekstoj, ilustraĵoj, tabeloj, ktp.)

## 4. Prezoj

Validas la interkonsentitaj prezoj aŭ la interkonsentita preza bazo (prezo je linio, je vorto, je karaktero, je horo aŭ tutinkluziva prezo). Eventuale, la aldonvalora imposto estas kromfakturita.

Se nek prezo nek preza bazo estis interkonsentita, aŭtomate aplikiĝas la kutima prezo je linio kalkulita surbaze de la cel-teksto (kutima linio ampleksante el 55 ĝis 60 karatrojn inkluzive de spacoj), koresponde kun la facileco-grado de la tradukado.

La kliento rajtas rompi la kontrakton eĉ antaŭ ricevo de la traduko, sed devas tamen komplete pagi la kostojn. Se estis interkonsentitaj prezoj je linio, je vorto aŭ je karaktero, por la netradukita parto la kostoj kalkuliĝas laŭ la fonto-teksto kaj ne la cel-teksto. Se estis interkonsentitaj prezoj je horo, la tradukistino-terminologino saĝe pritaksu la tempon kiun ŝi bezonintus por traduki la netradukitan parton. Ŝi devas forpreni de la kostoj nur la neefektivigintajn kostojn, kiuj rezultas de la frua rompo

de la kontrakto, kaj kion ŝi enspezis pere de aliaj kontraktoj plenumitaj dum ŝi liberis dank' al la kontrakto-rompo aŭ kion ŝi intence ne enspezis.

Krom se okazas anticipa pago aŭ se estas interkonsento pri iu limdato por la pago, la kostoj devas esti pagitaj kadre de la limdato indikita en la fakturo. La limtempo devas ampleksi minimume 10 tagojn. Post tiu limtempo, la kliento malfruas je la pago kaj la tradukistino-terminologino rajtas postuli nepagitaĵajn interezojn de 5% kaj fakturi kostojn de CHF 20.- por ĉiu memorigo.

### *5. Postaj ŝanĝoj kaj kromlaboro*

Se la kliento ŝanĝas pli ol iomete la fonto-tekston post sendado al la tradukistino-terminologino, ŝi rajtas peti, ke la liverado-limdato estu adekvate prokrastita. Krome, la tradukistino-terminologino rajtas postuli, aldone al la interkonsentitaj kostoj, iuj horaj kostoj por la farita kromlaboro.

Simile, laboroj kiuj ampleksas pli ol la nura tradukado, kiel ekzemple provlegado de presprovaĵoj, fakturiĝas je horo laŭ konvena prezo je horo.

### *6. Rajtoj de la kliento lige al la manko-garantio*

La kliento rajtas postuli senpagan forigon de mankoj en la traduko: manko signifas nur gravajn enhavo-erarojn. La kliento devas uzi tiun rajton kadre de 30-taga limtempo ekde la liverado-dato de la traduko, devas precize esprimi la mankojn kaj doni al la tradukistino-terminologino saĝan limtempon por forigi la mankojn.

Se, post prilaborado, la traduko daŭre enhavas mankojn, la kliento rajtas postuli aŭ novan vortumon kadre de 30-taga limtempo ekde la novfoja liverado aŭ konvenan prezo-malaltiĝon. Ne estas iu ajn alia rajto lige al la manko-garantio.

La rajtoj ligitaj al la manko-garantio perdiĝas se la mankoj ne estas anoncitaj dum la 30-taga limtempo post la liverado de la traduko. Se la mankoj estas anoncitaj kadre de tiu limtempo, la rajtoj ligitaj al la manko-garantio preskriptiĝas unu jaron post la unua liverado de la traduko.

### *7. Limigo de respondeco*

Repago kaze de kontrakto-rompo fare de la tradukistino-terminologino limiĝas al intencaj kazoj aŭ kazoj de grava neglektemo, kaj tiukaze necesas, ke la mankoj estu anoncitaj dum la pria limtempo.

### *8. Konfidenceco/Datum-protektado*

La tradukistino-terminologino engaĝigas sin por konfidencece trakti la dokumentojn de la kliento, interalie la fonto-tekston.

Krom se la kliento eksplicite esprimas la malon, la tradukistino-terminologino rajtas eliri el la supozo, ke la kliento akceptas neŝloŝitajn traktadon kaj sendadon de la traduko pere de Interreto. Sekve, la kliento kunportas kaj alfrontas la riskojn ligitajn al datum-protektado, kaj la riskojn de ŝanĝoj kaj de perdo de datumoj.

## 9. Aŭtor-raĵtoj

La kliento donas al la tradukistino-terminologino la bezonatajn rajtojn por traduki la fonto-tekston. La kliento garantias la posedadon de tiuj rajtoj kaj repagos al la tradukistino-terminologino eventualajn kostojn, se krompersonoj jure persekutas ŝin tiurilate.

El la aŭtor-raĵtoj kiuj ekestas rezulte de la traduko, la tradukistino-terminologino donas al la kliento la rajton uzi la tradukon por la celo, kiun ŝi povas distingi kiam la kontrakto estas interkonsentita. Ĉiu ajn alia uzo postulas ŝian konsenton. Ŝi ne rifuzu se la uzo respektas la moralan rajton de la aŭtoro kaj estas adekvate pagita.

Se estas la kutimo por tiu teksto-tipo, la kliento formale menciuj la nomon de la tradukistino-terminologino kaze ke la traduko publikiĝas.

La kliento povas fari ŝanĝojn en la traduko. Tamen, se la revortumo estas signifa, la kliento devas informi la tradukistinon-terminologinon pri tio, kaj ŝi rajtas rifuzi, ke ŝia nomo estu menciita.

La tradukistino-terminologino rajtas uzi la fonto-tekston kaj la cel-tekston, kune kun la dokumentoj donitaj de la kliento, kiel labor-instrumentojn por realigi glosarojn, vort-listojn aŭ tekst-blokojn je anonima formo, por enmeti en traduk-memorojn kaj/aŭ pludoni al krompersonoj.

## 10. Aplikebla leĝo/Jurloko

La kliento kaj la tradukistino-terminologino laŭeble kune solvu la eventualajn malkonsentojn, kiuj rezultiĝas el la kontrakto.

La kontrakto inter la kliento kaj la tradukistino-terminologino submetiĝas al la svisa juro. La nurnura jurloko estas tie, kie la tradukistino-terminologino havas sian domicilon (laŭ la kvina artikolo de la svisa leĝo pri jurlokoj: france "*Loi fédérale sur les fors en matière civile*").

Ĝenevo, dum Aŭgusto 2017.